

Janvier - février
Januaro - februaro
2008

Esperanto la verda stelo



ASSOCIATION
ESPERANTISTE
Dumonata revueto
numero 47

esperanto94.info

KALENDARO

*Babilrondo Sam. 19/01/08
Champigny/Marne 14 h :
6 rue Eugène Brun.*

*Repas - Conférence
sam. 02/02/08*

*Repas
(12h)*

*Conférence
(14h30)*

*Bar de la Marine (16 quai
de Choisy) Choisy le Roi*

*Retenir le repas :
01 48 92 02 16*

*Journée du Livre Dim.
03/02/08 Le Royal ,
Choisy*

Journée du Livre – Les Amis de la Cité

Dimanche 3 février 2008
Salle le Royal à Choisy
près de la sortie due RER

Jean-Pierre DUCLOYER
y tiendra le stand

« **ESPERANTO** »

Livres présentés :

- * Une langue pour l'Europe
- * Saint Eloi
- * Mille mots pour ma maison
- * Mil vortoj por mia hejmo
- * La clé retrouvée de la tour de Babel
- * Bretonaj fabeloj (fables bretonnes en espéranto)

Notre assemblée générale aura lieu le 15 mars 2008 à 15 h à Champigny/Marne, au 6 rue Eugène Brun, repas en commun à 12h (voir l'information et le pouvoir en annexe)

L'ASSEMBLÉE GÉNÉRALE DES NATIONS UNIES PROCLAME L'ANNÉE 2008 « ANNÉE INTERNATIONALE DES LANGUES »

Le Conseil d'Administration d' ESPERANTO 94 vous souhaite une :



**Bonne année
Bonne année
2008 Jaron**

Glückliches Neues Jahr ; Ano Nova feliz ; Buono Anno ;
Happy New Year ; Gelukkig Nieuwjaar ;

TABLE DES MATIERES		TEMARO	
p. 2	Table des matières / Petites annonces	p. 2	Temaro / Anoncetoj
p. 3	L'espéranto a-t-il perdu ?	p. 3	Ĉu esperanto malvenkis ,
p. 4	UEA et UNESCO	p. 4	UEA kaj UNESCO
p. 5	Liberté et la sûreté des communications	p. 5	Libereco kaj sekureco de la komunikado
p. 6	Suite de la page 6 ; Théâtre	p. 6	Sekvo de la paĝo 6 ; Teatraĵo
p. 7	Accueillir des voyageurs espérantistes	p. 7	Gastigi vojaĝantajn esperantistojn
p. 8	Un livre : Les enfants des pauvres ; UEA sera-t-elle Prix Nobel de la Paix ?	p. 8	Libro : infanoj de la malriĉuloj ; Ĉu Uea estos Nobel-pacpremio ?
Imprimerie Spéciale			
Poŝtadreso : LA VERDA STELO – ESPERANTO 94 3 Rue Pablo Picasso Appartement 507 94600 Choisy le Roi Francio / France		Direktoro : Sébastien CARREZ (01.43.78.55.19) Courriel : esperanto94@laposte.net Redaktorino : Tereza (01.45.76.10.57) Korektanto : Claude GICQUEL Sendanto : Oktavio	

La Anoncetoj

UNE IDEE A SUIVRE	IDEO SEKVENDA
<p><i>Message de novembre de l'« University of New Mexico ». Expérience utile à utiliser pour informer.</i></p> <p>«<u>j'ai présenté l'espéranto à des étudiants en pédagogie dans mon université.</u> Ils préparent un doctorat ou une maîtrise de langues, surtout en français ou en allemand et en linguistique. Après ce diplôme, la plupart d'entre eux enseigneront la littérature ou la linguistique dans les universités américaines. Déjà, ils enseignent les langues à des débutants dans notre université. Cette classe de débutants en pédagogie a pour but d'améliorer l'enseignement actuel et de permettre ensuite des études approfondies en pédagogie</p> <p>Souhaitant surprendre et capter l'attention des étudiants, après quelques explications, <u>j'ai remis à chaque étudiant un message à son nom, rédigé par un espérantiste volontaire d'un pays étranger</u> : expérience nouvelle pour les étudiants. Derek Roff »</p>	<p><i>Novembra mesaĝo de « University of New Mexico » pri valora sperto pri informado.</i></p> <p>«<u>Mi prezentis Esperanton al studentoj pri pedagogio, ĉe mia universitato.</u> Ili studas doktoran aŭ majstran studprogramon pri lingvoj, ĉefe la francan aŭ germanan kaj lingvistikon. Post ricevo de la diplomo, plejparte instruos literaturon aŭ lingvistikon en usonaj universitatoj. Jam, ili instruas lingvojn al komencantoj en nia universitato. Tiu komenca pedogogia klaso celas plibonigi la nunan instruadon kaj doni bazon por postaj kaj pli profundaj pedagogiaj studoj.</p> <p>Dezirante fari ion surprizan kaj atento-kaptan por la studentoj, post kelkaj klarigoj, <u>mi donis al ĉiu studanto retmesaĝon je ties nomo, verkita de volontula esperantisto de alia lando.</u> Estas tute nova sperto por la studentoj. Derek Roff »</p>
TOUS NOS VOEUX A HELOÏSE	BONDEZIROJN AL HELOÏSE
<p>Notre président Sébastien et son épouse Valérie, nous font part de la naissance de leur fille Héloïse le 12 décembre à 12 h (3 kg 270 et 51 cm)</p> <p>Toutes nos félicitations au heureux parents</p>	<p>Nia prezidanto Sebastien kaj lia edzino Valérie informas nin pro la naskiĝo de sia filino Héloïse, la 12an de decembro je la 12a.</p> <p>Ni gratulas la feliĉajn gepatrojn.</p>

L'ESPERANTO A-T-IL PERDU ?

Dans un article (sept 07) du *Rotarien* le professeur Pierre Lemercier dit : *l'espéranto, langue simple, synthétique et intelligente n'a pas réussi à s'implanter; et pourtant l'idée était belle.* Voici des extraits de la réponse d'H. Masson, secrétaire de SAT-amikaro :

«...Peut-être faut-il établir un "diagnostic" À mon avis, l'Espéranto se porte bien, même si on en/le parle encore trop peu. L'idée des Droits de l'Homme a-t-elle réussi à s'implanter partout ? On peut faire un parallèle avec l'histoire de la communication. Le droit de vote des femmes a mis beaucoup de temps aussi à s'implanter. De même pour les chiffres indo-arabes en Europe. Le système métrique, plus logique et pratique n'est-il pas en train de régresser ? A preuve l'utilisation des pieds, pouces, pintes... pour les écrans de TV, ordinateurs, pneumatiques, pulvérisateurs, voiliers, imprimerie, etc.

Un ancien conseiller de l'administration Clinton, David Rothkopf affirmait en 1997 dans Foreign Policy à New-York :

"Dans l'intérêt économique et politique des États-Unis il faut veiller à ce que, si le monde adopte une langue commune, ce soit l'anglais, s'il s'oriente vers des normes communes en matière de télécommunications, de sécurité et de qualité, ces normes soient américaines; si ses différentes parties sont reliées par la télévision, la radio et la musique, les programmes soient américains; et si s'élaborent des valeurs communes, ce soient des valeurs dans lesquelles les Américains se reconnaissent."

Je crois enfin utile de signaler que, voici bientôt cent ans, Pierre Corret (1881-1936) avait défendu la seconde thèse de doctorat de 144 pages, en France, en relation avec l'espéranto sous le titre :

"Utilité et possibilité de l'adoption d'une langue internationale auxiliaire en médecine". On peut retrouver des informations diverses sur les pages internet de SAT-amikaro :

<http://www.esperanto-sat.info/rubrique4.html>

ĈU ESPERANTO MALVENKIS ?

En artikolo de la Rotarien (sept.07) Profesoro Pierre Lemercier diris : « la lingvo Esperanto, simpla, sinteza kaj inteligenta ne sukcesis venki, kvankam sia ideo estis bela... » Jen eltiraĵoj de respondo de H.Masson, sekretario de SAT-amikaro :

«... Eble necesas fari diagnozon. Laŭ mi Esperanto bone fartas, eĉ se oni ankoraŭ ne sufiĉe aŭ priparolas aŭ uzas ĝin. Ĉu la ideo pri Homrajtoj jam sukcesis ĉie ? Eblas fari komparon inter la homrajtoj kaj rajtoj de lingvokomunikado. Voĉdonrajto de la virino bezonis tempon por realiĝi. Okazis same por la hind-arabaj ciferoj en Eŭropo. Ĉu, la metra sistemo, pli logika kaj praktika, ne regresas ? : uzado de futoj, coloj, pindoj... por televidekranoj, komputoroj, pneŭmatikoj, vaporumiloj, velŝipoj, presarto, ktp ?

Malnova konsilanto de la estraro de Clinton, David Rothkopf, asertis dum 1997 en Foreign Policy el ? De ? Novjorko :

« Profitas por usonaj ekonomio kaj politiko zorgi ke se la mondo elektas komunan lingvon, ĝi estu la angla, se ĝi enkondukas komunajn normojn por komunikado, sekureco kaj kvalito, tiuj normoj estu usonaj ; se ĝiaj tiuj ? diversaj partoj estas ligataj per televizio, radio kaj muziko, la programoj estu usonaj ; se ellaboriĝas komunaj valoroj, ili estu valoroj en kiuj la Usonanoj sin rekonas. »

Finfine, mi kredas grave indiki ke, jam de baldaŭ cent jaroj, Pierre Corret (1881-1936) defendis en Francio, la 2an doktoriĝan tezon de 144-paĝaj rilate al esperanto, sub la titolo :

«Utileco kaj ebleco elekti internacian helpilingvon en medicino» Eblas trovi informojn pri diversaj temoj en la reto je la paĝaro de SAT-amikaro :

<http://www.esperanto-at.info/rubrique4.html>



UEA partecipe à la conférence générale de l'Unesco

L'Association Universelle pour l'Espéranto (UEA), qui entretient des relations avec l'Unesco depuis 1954, a participé à la Conférence Générale de l'Unesco à Paris (16 oct.-3 nov.) à titre d'observateur. Les délégués d'UEA sont le vice-président des relations extérieures M. Ranieri Clerici et le représentant permanent d'UEA au siège parisien de l'Unesco Mme Renée Triolle et le Dr Barbara Despiny.

De même la participation à la conférence de l'Unesco des observateurs de la Ligue



Internationale des enseignants (ILEI), M. Jean-Pierre Boulet, Mme Monique Arnaud et Dr François Lo Jacomo y renforce la présence espérantiste.

En liaison avec la Conférence Générale, s'est déroulé le Forum International de la Société Civile le 25 octobre. Y ont participé pour UEA R. Triolle, pour ILEI P. Boulet. Renée Triolle demanda publiquement au ministre de l'éducation de Jordanie pourquoi il s'exprimait en anglais et non dans sa propre langue. Il répondit « qu'il voulait toucher un public plus large » ; mais ensuite il ne parla qu'en arabe.


Les délégués espérantistes ont utilement utilisé la Conférence et le Forum pour contacter les Officiels de l'Unesco et les représentants des autres O.N.G. Ils ont distribué des informations en diverses langues sur l'Espéranto, principalement le Manifeste de Prague et la résolution du 92e Congrès Universel de Jokohama. Au Ministre iranien des affaires extérieures Mme Triolle a pu remettre un exemplaire de la revue bilingue « L'espérantiste iranien ».

[Comuniqué de presse d' UEA]

UEA partoprenas la ĝeneralan konferencon de Unesko

Universala Esperanto-Asocio, kiu oficiale rilatas kun Unesko ekde 1954, ĉeestis la 34-an Ĝeneralan Konferencon de Unesko en Parizo (16-an de okt. Ĝis la 3 nov.) kiel observanto. La delegitoj de UEA estas la Vicprezidanto pri eksteraj rilatoj s-ro Ranieri Clerici kaj la daŭraj reprezentantoj de UEA ĉe la Pariza sidejo de Unesko s-ino Renée Triolle kaj d-ino Barbara Despiny.

La esperantistan partoprenon en la Unesko-konferenco plifortigas ankaŭ la observantoj de



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) s-ro Jean-Pierre Boulet, s-ino Monique Arnaud kaj d-ro François Lo Jacomo.

Kunkune la Ĝenerala Konferenco okazis ankaŭ Internacia Forumo de Civila Socio la 25-an de oktobro. Por UEA partoprenis R. Triolle kaj Despiny, por ILEI estis Boulet. La publika demando de Renée Triolle al la ministro pri edukado de Jordanio, estis kial la ministro parolis angle kaj ne en sia gepatra lingvo, tiu ĉi respondis, « ke li volis tuŝi pli grandan publikon » ; sed poste li tamen parolis nur arabe.

La esperantistaj delegitoj draste utiligis la Konferencon kaj la Forumon por kontakti oficialulojn de Unesko kaj reprezentantojn de aliaj N.R.O-j. Ili disdonis multe da informiloj pri Esperanto, ĉefe diverslingvajn versiojn de la Manifesto de Prago kaj de la rezolucio de la 92-a Universala Kongreso en Jokohamo. Al la irana Ministro pri eksterlandaj aferoj s-ino Triolle povis doni ekzempleron de la dulingva revuo "Irana Esperantisto".

[Gazetara komuniko de UEA]

**La liberté et la sûreté des communications :
Voilà la vraie démocratie !**

La quantité d'informations que nous échangeons sur internet augmente : discussion entre amis, photos du dernier enfant ... mais aussi : discussions professionnelles, réponses aux appels d'offres publics, etc.

Les États-unis (mais d'autres pays également) ont créé à partir de 1947 un système pour écouter et analyser les communications que l'on nomme « ECHELON ». Ce réseau administré par l'Agence pour la Sécurité Nationale (NSA), regroupe les services de renseignements du Canada (CSE), du Royaume-Unis (GCHQ), de l'Australie (DSD) et de la Nouvelle-Zélande (GCSB) : tous anglophones.

Le but du réseau "Echelon" est de contrôler toutes les informations circulant sur la planète. Ainsi, téléphone, fax, internet mais aussi vos messages électroniques sont contrôlés, écoutés, triés, analysés par "Echelon".

Ce système permet à la NSA et aux autres services de faire de l'espionnage : industriel, diplomatique, politique, militaire, commercial mais aussi privé.

Dans les années 1990, le réseau échelon a été utilisé pour espionner les participants lors de négociations entre états et donner ainsi un avantage aux Anglophones. Ce fut le cas lors de la négociation de l'Accord de Libre-Échange Nord-Américain (ALENA), les délégués mexicains ont été écoutés.

Plus près de nous, les sociétés s'intéressent de près à nos habitudes, l'information coûte très cher, on rencontre donc d'étranges pratiques : On nous demande beaucoup d'informations pour recevoir une simple lettre électronique, quelques sites internet s'intéressent même au contenu de vos courriels. Le célèbre moteur de recherche Google a lancé un service de messagerie : Gmail. Comme indiqué sur le site, vous aurez des publicités « en rapport direct avec le contenu de vos messages ». Le contenu de vos messages est donc lu et analysé automatiquement par Google, société Américaine.

La réponse de l'Europe à ce problème a été d'inciter les Européens au chiffrement des courriels. En France, le chiffrement a longtemps été restreint (par l'utilisation de clé de chiffrement très courte et donc facilement déchiffirable), mais la loi a changé et la longueur des clés est maintenant libre.

Plus le nombre de messages chiffrés est important (même s'ils ne sont pas importants) et plus ce sera difficile d'écouter les sociétés et même les habitants de nos pays.

Je conseille d'utiliser le logiciel « GnuPG » associé au client de messagerie « Thunderbird » avec l'extension « enigmail ». Ces logiciels sont tous libres et gratuits et disponibles sur notre site internet. (suite page 6)



La libereco kaj la sekureco de la komunikadoj : jen la vera demokratio !

La kvanto de informoj kiujn ni interrete interŝanĝas kreskas : interamikaj diskutoj, fotoj de la lasta infano... sed ankaŭ : istaj diskutoj, respondoj al publikaj kontraktoj, ktp.

Usono (sed ankaŭ aliaj landoj) kreis ekde 1947 sistemon por aŭskulti kaj analizi la komunikadojn, kiu nomiĝas « ECHELON ». Tiu reto administrata de la NSA (Oficejo por la Nacia Sekureco), arigas la informajn oficojn el Kanado (CSE), el Britujo (GCHQ), el Aŭstralio (DSD) kaj el Nov-Zelando (GCSB) : ĉiuj estas anglalingvaj.

La celo de la reto "Echelon" estas kontroli ĉiajn informojn cirkulantajn ĉirkaŭ la mondo. Do, telefono, telekopio, interreto sed ankaŭ viaj retmesaĝoj estas kontrolitaj, aŭskultitaj, klasifikitaj kaj analizitaj de "Echelon".

Tiu sistemo ebligas al NSA kaj al aliaj oficoj realigi spionadon : industrian, diplomatan, politikan, militan, komercan sed ankaŭ privatan.

Dum la jaroj 1990, la reto "Echelon" estas uzita por spioni la partoprenantojn dum interŝtataj traktadoj kaj tiel disponigis avantaĝon al la anglalingvanoj. Tio okazis dum traktadoj pri libera interŝanĝo en Norda Ameriko (ALENA), kie la meksika delegitaranoj estis aŭditaj.

Pli proksima al ni, la societoj interesiĝas pri niaj kutimoj, la informado estas tre multekosta, ni renkontas do strangajn praktikojn : Oni demandas nin multe da informadoj por ricevi simplan retleteron, kelkaj retpaĝaroj interesiĝas eĉ pri la enhavo de viaj retmesaĝoj. La famkonata serĉilo Google startigis mesaĝilon : Gmail. Tiel indikita sur la retpaĝaro, vi havos reklamon rilate al la enhavo de viaj mesaĝoj ». La enhavo de viaj mesaĝoj estas do aŭtomate legata kaj analizata de Google, amerika societo.

La respondo de Eŭropo pri tiu problemo estis instigi la Eŭropanojn ĉifri siajn retmesaĝojn. En Francio, la ĉifrado longatempe estis restriktita (pro uzado de Ĉifraj ŝlosiloj tre mallongaj kaj do tre facile malĉifreblaj), sed la leĝo ŝanĝiĝis kaj la longeco de ŝlosiloj estas nun libera.

Ju pli la nombro da ĉifritaj mesaĝoj estos granda (eĉ se ili ne estas gravaj) des pli estos malfacile aŭskulti la societojn kaj ankaŭ la loĝantojn en niaj landoj.

Mi konsilas vin uzi la programon « GnuPG » kunligitan al la mesaĝilo « Thunderbird » kun la aldono « Enigmail ». Ĉiuj programoj estas liberaj, senpagaj kaj disponeblaj ĉe nia retpaĝaro. (Sekvo paĝo 6)

<p>La liberté et la sûreté des communications : Voilà la vraie démocratie ! (suite)</p>	<p>La libereco kaj la sekureco de la komunikadoj : jen la vera demokratio ! (sekvo)</p>
<p>Je conseille à tous : particuliers, chefs d'entreprises ou personnalités politiques, d'installer un système pour chiffrer leurs messages.</p> <p>On dit souvent « Je n'ai rien à cacher », mais nous devons protéger notre vie privée, et ce n'est pas lorsque la dictature est établie que l'on doit lutter pour la liberté... mais c'est en protégeant nos droits et notre capacité de communication que nous défendrons la démocratie.</p> <p>Un petit guide d'installation est disponible sur notre site rubrique « Informatique ». S. Carrez</p>	<p>Mi konsilas al ĉiuj : privatuloj, societestroj aŭ politikistoj, instali programon por ĉifri iliajn retmesaĝojn.</p> <p>Oni ofte diras : « Mi havas nenion kaŝendajn », sed ni devas protekti nian privatan vivon, kaj ne estas kiam la diktatoreco estas establita ke oni devas batali por la libereco... sed estas protektante niajn rajtojn kaj niajn kapablecon de komunikado ke ni defendos la demokration.</p> <p>Malgranda instalgvado estas havebla ĉe nia retpaĝaro, en la rubriko « informatique » (Komputiko). S. Carrez</p>
<p>T HÉÂTRE</p>	<p>TEATRAĴO</p>
<p>Un nouvel initié connecte le monde du théâtre avec l'espéranto.</p> <p>« David Berga Management », agence professionnelle de théâtre présente un blog créé pour les espérantistes. On peut y trouver une sélection de vidéos de diverses compagnies internationales et des informations pour collaborer.</p> <p>Voici les liens :</p> <p>On y peut lire :</p> <p>http://davidbergaesperanto.blogspot.com/ http://www.davidberga.cat/</p> <p>« Êtes-vous acteur, régisseur, présentateur de théâtre ou êtes-vous en rapport quelconque avec le monde du spectacle, vous organisez des fêtes locales ou êtes responsable d'un festival ? Ou vous avez simplement des contacts avec ce monde. Dans tous les cas, votre collaboration nous intéresse. Dans ces pages, nous vous présentons des spectacles sans paroles de notre répertoire, mais nous en avons d'autres en anglais, catalan et espagnol.</p> <p>Il est possible au gouvernement catalan de financer le voyage de nos acteurs et de nos troupes. Nous n'avons besoin que d'une municipalité ou autre institution, qui pourrait contracter et payer le spectacle. L'expérience pourrait être intéressante pour vous et contribuer au prestige de l'espéranto ».</p> <p>David</p>	<p>Nova iniciato kunligas la teatran mondon kun esperanto.</p> <p>« David Berga Management », profesia teatra agentejo prezentas blogon, speciale kreitan por la esperantistaro. En ĝi oni povos spekti selekton de videoj el diversaj internaciaj kompanioj kaj la informojn pri la ebleco kunlabori:</p> <p>Jen la ligiloj :</p> <p>En ĝi oni povas tion legi :</p> <p>« Ĉu vi estas aktoro, reĝisoro, teatra reprezentanto aŭ vi iel rilatas al la mondo de la spektaklo, vi organizas urbajn festojn aŭ respondecas pri festivalo ? Aŭ simple vi havas kontaktojn en tiu mondo. En tiu okazo interesas al ni via kunlaboro.</p> <p>En ĉi paĝo oni montras senvortajn spektaklojn el nia repertuaro sed ni disponas aliajn en la angla, kataluna kaj hispana.</p> <p>Ekzistas ebleco ke la kataluna registaro financu la vojaĝon de niaj aktoroj kaj trupoj. Ni nur bezonas magistraton aŭ alian institucion kiu emus kontrakti kaj pagi la surlokan spektaklon. La sperto povos esti tre riĉiga por vi kaj ĝi kontribuos al la prestiĝo de Esperanto. »</p> <p>David</p>



ACCUEILIR DES VOYAGEURS ESPERANTISTES	GASTIGI VOJAĜANTAĴN ESPERANTISTOJN
<p>Un des intérêts de l'espéranto, c'est la possibilité d'accueillir des visiteurs étrangers. Pendant l'été, pendant la rencontre espérantiste à Plouezec (en Bretagne), j'ai rencontré une Brésilienne Neima, très jeune retraitée, qui voyage en Europe. J'ai proposé de l'héberger quand elle visiterait Paris. C'est en novembre qu'elle est venue et ce fut un grand plaisir de parler ensemble grâce à l'espéranto.</p> <p>Beaucoup d'espérantistes par le monde font ainsi. Cela permet, étant hébergé, de faire l'économie de l'hôtel mais surtout d'avoir un contact réel avec la vie d'un étranger, d'échanger facilement, de recevoir des conseils utiles pour la visite et la connaissance du pays.</p> <p>Il existe un répertoire « Pasporta servo » qui permet de choisir son hébergement et de connaître les conditions de l'accueil.</p> <p>Monique R. dans une proche banlieue nord de Paris accueille souvent des voyageurs. Elisabeth B. aussi, qui, il y a peu de temps a écrit ce message :</p>	<p>Unu el la interesoj de esperanto estas la ebleco akcepti gastojn aŭ viziti fremdajn landojn. Dum ĉi-somero, dum esperantista renkontiĝo en Pluezek (Bretonio), mi renkontis Brazilaninon Neima tre june emeritanta, kiu rondiras Eŭropon. Mi proponis gastigi ŝin okaze de ŝia vizito en Parizo. Tio okazis dum semajno en novembro kaj estis granda plezuro interparoli kune dank'al esperanto.</p> <p>Multaj esperantistoj tra la tuta mondo same faras. Tio ebligas, estante gastigita, ŝpari hotelkonston kaj ĉefe travivi veran vivon de eksterlandano, facile interŝanĝi, ricevi konsilojn utilajn por la vizito kaj kono de la lando.</p> <p>Ekzistas repertuaro : « Pasporta servo », kiu ebligas elekti gastiganton, precizante la kondiĉojn de la akcepto.</p> <p>Monique R. en norda ĉirkaŭurbo proksime de Parizo foje gastigas vojaĝantojn. Ankaŭ Elizabet' kiu antaŭnelonge verkis tiun mesaĝon :</p>
<p>« En 2007, j'ai accueilli un grand nombre d'espérantistes, dans le cadre du « Pasporta Servo ».</p> <p>Ont séjourné chez moi : un groupe de 7 Roumains (un enseignant et 6 fillettes) 1 Iranienne, 1 Français, 1 Slovène, 1 médecin chilien, 1 Tanzanien, 1 Ukrainien, 2 Dannois (père et fils), 2 Litوانيens et demain viendront du Luxembourg : un couple et leurs trois enfants. »</p> <p>Je conseille à tous de profiter de l'avantage de l'Espéranto ; si vous n'avez pas encore été reçu ou n'avez pas accueilli, faites-le au profit de l'amitié internationale.</p> <p style="text-align: right;">Tereza Sabatier</p>	<p>« En 2007, mi akceptis grandan nombron da esperantistoj, kadre de la Pasporta Servo.</p> <p><i>Gastis ĉe mi : grupo de 7 Rumanoj (instruisto kaj 6 knabinoj), Iranino, Franco, Sloveno, ĉila kuracisto, Tanzaniano, Ukraino, 2 Danlandanoj (patro kaj filo), 2 Litovoj kaj morgaŭ alvenos familio el Luksemburgio : gepatroj kun 3 infanoj. »</i></p> <p>Mi konsilas al ĉiuj profiti tiun avantaĝon kiun alportas Esperanto ; se vi ankoraŭ ne estis gastigato aŭ gastiganto, tion faru profitante internacian amikecon.</p> <p style="text-align: right;">Tereza Sabatier</p>
<p>TRADUKI ĈERCOJN : ESTAS BONA</p>	<p>MANIERO POR EKZERCIĜI</p>
<p>Dum vizito en psikiatria instituto, vizitanto demandas al kuracisto laŭ kia kriterio oni difinas ĉu malsanulo estas enkarcerigota.</p> <p>« Nu, la kuracisto diras, ni plenigas per akvo bankuvon, kaj ni donas al li kuleron, tason kaj sitelon, petante lin malplenigi la bankuvon. »</p>	<p>« Ha ! mi komprenas, la vizitanto diras, bonsanulo nepre elektos la sitelon, ĉar ĝi estas pli granda ol kulero aŭ taso. »</p> <p>« Ne ! la kuracisto respondas, bonsanulo eltiros la ŝtopilon el la kuvo.</p> <p>Ĉu vi deziras dormĉambbron kun ĉirkaŭvido ?</p>



<p>UN LIVRE ? : « LES ENFANTS DES PAUVRES »</p> <p>Pour les fêtes de fin d'année, pourquoi ne pas offrir un livre ? Je vous conseille « La infanoj de la malriĉuloj » traduit en espéranto en 1972.</p> <p>« Roman autobiographique d'un polique et écrivain de Nouvelle Zélande et ex-ministre. Oeuvre qui fit fureur à l'époque ; bonne traduction (C. Minnaja, "Heroldo de Esperanto").</p> <p>C'est un livre qui retrace la vie d'un enfant pauvre, qui arrivera au sommet politique de son pays. Il est tout à fait recommandé à des lecteurs débutants.</p>	<p>LIBRO ? : « INFANOJ DE LA MALRIĈULOJ »</p> <p>– Por la jarfinaj festoj, kial ne donaci libron ? Mi konsilas NA « La infanoj de la malriĉuloj » tradukita esperanten en 1972. kies prezento jenas: « Autobiografia romano de novzelanda politika verkisto kaj eksministro tiu verko siatempe furoras; kun traduko adekvata. (C. Minnaja, "Heroldo de Esperanto") ».</p> <p>Estas libro temas pri la vivo de malriĉa infano, kiu sukcesos atingis ĉefan regantan postenon de sia lando. Ĝi estas tute konsilinda por komencantoj.</p>
<p>UEA sera-elle Prix Nobel de la Paix</p> <p>L'Espéranto langue de la paix permet des contacts démocratiques : tous les locuteurs sont à égalité, la langue n'étant reliée politiquement ou historiquement à aucun Etat. Une langue internationale ne peut pas être une langue nationale, car les locuteurs natifs seraient avantagés.</p> <p>Par ekzemple, l'Espéranto est enseigné dans des <i>camps de réfugiés</i> en Afghanistan sous le nom de langue de la paix. Enseignée parallèlement à l'informatique, à des représentants de <i>peuples premiers</i>.</p> <p>L'UNESCO l'a bien compris: l'Espéranto poursuit les mêmes buts qu'elle. En 1954 et 1985, cette organisation mondiale a voté deux résolutions attirant l'attention sur les efforts positifs de l'Association Universelle d'Espéranto (UEA).</p> <p>En 2008, cette association va fêter son centième anniversaire. Elle va être proposée pour recevoir le Prix Nobel de la Paix. Cette démarche ne peut être initiée que par des parlementaires d'Etats reconnus. C'est ce qu'ont fait Mesdames Gisèle Ory, <i>conseillère aux Etats</i>, et Francine John-Calame, <i>conseillère nationale</i>. Il y a quelques jours, leur lettre est partie pour Oslo.</p>	<p>Ĉu UEA estos Nobel-Pacpremio ?</p> <p>Esperanto estas la lingvo de paco ; ĝi ebligas kontaktojn demokratajn : la dialogantoj estas egalrajtaj kaj la lingvo ne havas politikajn aŭ historiajn ligojn kun iu ŝtato. Lingvo de iu nacio ne povas esti lingvo internacia, ĉar la denaskaj parolantoj havas avantaĝon.</p> <p>Ekzemple, en Afganio, Esperanto estas instruata en <i>rifuĝejoj</i> kiel "Lingvo de la paco". La Internacia Lingvo, instruata kune kun komputilaj konoj al reprezentantoj de <i>indiĝenaj popoloj</i>.</p> <p>UNESKO bone komprenis ke Esperanto havas la samajn celojn kiel ĝi. La monda organizo voĉdonis du rezoluciojn, en 1954 kaj en 1985, atentigante pri la pozitivaj klopodoj de Universala Esperanto-Asocio (UEA).</p> <p>UEA festos sian centjariĝon en 2008. Ĝi estos proponita kiel kandidato por la Nobel Pacpremio. Tion rajtas iniciati nur parlamentanoj de agnoskitaj ŝtatoj. Tiel faris S-inoj Gisèle Ory, <i>ano de la svisa ŝtatara konsilio</i>, kaj Francine John-Calame, <i>ano de la svisa nacia konsilio</i>. Ilia letero foriris al Oslo antaŭ kelkaj tagoj.</p>

